

B.K. 1953 – Teatraĵo – unua premio
William Auld – Skotlando

KVAZAŬ BIRDOJ KONSTRUAS

UNUAKTA KOMEDIO

*Ho, feliĉuloj, kiuj, kvazaŭ birdoj,
konstruas neston post la enamiĝo
el molaj plumoj de la dolĉaj virtoj.*

K. Kalocsay

ROLOJ

Briseo
Prokris
Rodopea

SCENO: *Virina buduaro, Ateno, posttagmeze. Kelkmil jarojn antaŭ Kristo*

PROKRIS, *sola*. Venas RODOPEA

RODOPEA

Sinjinorino ...

PROKRIS

Kial, Rodopea, vi venas,
Taŭzante la splenokvaston de miaj sopiroj?
Vi scias, ke posttagmeze absolutan trankvilon
Mi deziras, por ke antaŭ la sociaj devoj
De la vespero mi firmigu mian aman funebbron
Kontraŭ la atencoj ĉarme kaj asidue
Planitaj de la lascivaj kaj ambiciaj lordoj
De nia Ateno. Estas jam sufiĉe malfacile
Teni akra la glavon de mia edzina fidelo
Por ĉi senfina skermado, sen tio, ke akriĝi
Ĝin posttagmeze per la ŝtono de dolĉaj rememoroj
Mi ne havu okazon. Kion vi deziras?

RODOPEA

Pardonu, sinjinorino. Sed ĉi tiu sinjinoro
Scias diable persvadi, kaj cetere
Iel impresas per sinteno sincera.

PROKRIS

Kiu sinjinoro ĉi-foje subaĉetis
Per flataj vortoj kaj esplorema mano
La citadelon de via lojalo? Mia mano,
Se ĝi pune esploros vian korpon, ne karesos

Tiel milde-flate. Diru al ĉi sinjoro,
Kio ajn li estas, ke mi neniun allasas
En la nuna momento. Se lia afero jukas,
Mi volonte akceptos lin ĉe la vespera festo
Kaj komplezos laŭpove. Dume gastigu lin
Laŭ la pretendoj de lia rango.

RODOPEA

Jes, sinjorino.

PROKRIS

Rodopea, sentaŭgulino, vi ne sciigis al mi
La nomon de nia vizitanto.

RODOPEA

Briseo, sinjorino.

PROKRIS

Ĉu io tranajlis al vi la langon, knabino?
Ordinare ĝi flirtas kaj klakas kvazaŭ lavaĵo
Blovata de bruska vento, sed nun,
Pri simpla alveno de iu sinjoro
Ĝi kuŝas mute kiel limako sur laktuka
Folio. Kial vi nenion diras?

RODOPEA

Se la sinjorino nur permesos paroli –

PROKRIS

Jam tedas min la afero. Iru, Rodopea.

RODOPEA

Bone, sinjorino. Li nomiĝas Briseo,
Ĉi tiu sinjoro. Li aspektas soldato, bronza,
Ruĝbarba, ne alta tamen tre fortika,
Kaj li devenas de mi ne scias kiu fremdlando,
Kvankam mi mem tuj supozis lin atenano
Pro la hejmaj tonoj de lia greka elparolo,
Kaj pro la nuancoj de lia konduto, kiuj taŭgas
En Ateno kvazaŭ en nia urbo ensorbitaj
Kune kun la patrina lakto. Sed li diris,
Ke neniam antaŭe li vizitis Atenon,
Kaj ke eĉ nun li venas nur por –

PROKRIS

Por kio?

Ĉu iam oni afliktiĝis de tia malsprita
Sklavino?

RODOPEA

Ne, sinjorino. Li venis nur por –

Kompreneble mi raportas laŭ via deziro, nur,
Vortojn, kiuj eble ofendos la integron
De via ĉie-respektata kaj simpatiata fidelo
Al la honoro de nia mastro Cefalo, kaj mi miras,
Ke famo pri tio verŝajne ne penetris
Ĝis la lando, kies nomon mi forgesas, kiu naskis
Ĉi tiun Briseon, ĉar se ĝi tien atingus,
Li certe ne kuraĝus tian impertinentaĵon
Silabi.

PROKRIS

Do. Impertinenton mi scios
Kvitigi.

RODOPEA

Tion mi mem diris. Sed li respondis,
Ke ĝuste tion li esperas, kaj tial li venis.

PROKRIS

Rodopea, se via haŭto deziras eviti
Tiklon de mia vipo, prononcu klare
Kaj senprokraste la vortojn de tiu ĉi fremdulo.

RODOPEA

Mi ja diris, sinjorino, ke li venis nur por
Kisi la manon de la plei bela atenanino.

PROKRIS

Ĉu tion nur? Impertinentulo! Forsendu lin,
Dirante, ke li serĉu aliloke sian celiton,
Ĉar Prokris ne meritas lian flatan priskribon,
Kaj cetere ŝi estas eterne kaj neŝanceleble
Fidela al sia provizore forestanta edzo.

RODOPEA

Volonte, sinjorino.

(*Venas* BRISEO)

BRISEO

Ĉu en ĉi tiu laŭbo
Floras la senkompara sinjorino Prokris?

PROKRIS

Kiu sin lanĉas sen invito en mian ĉambron,
Strangule kondukante kvazaŭ pastro abstinencon
Predikanta en taverno? Ĉu konato via,
Sklavino? Se jes, bonvolu direkti lin
Al la servista domparto, kaj zorgu estonte,
Ke tiaj insolentuloj ne venu antaŭ miajn
Okulojn.

BRISEO

Mia nomo, plej altestiminda,
Estas Briseo, kaj en mia lando nobelo
Mi estas. Mi scias, ke mia konduto ŝajnas,
Unuavide, iom aŭdaca, iom, ni diru, impeta;
Sed mi kuraĝas esperi, ke post mia klarigo
La pura ardo kaj ĉasta intenco
De mia entuziasmo pledos por mi sukcese
Antaŭ la tribunalo de via sendube pravigebla
Indigniĝemo. Per tiu komplika kaj, mi suspektas,
Malekzakta figuro, mi klopodas peti –

PROKRIS

Sinjoro, en nia lando nobeloj ne
Sin trudas aŭdace, ankaŭ ne impete,
En sinjorinajn buduarojn. Ili atendas
Inviton. Sendube en via lando estas alie:
Kion oni atendu de fremduloj? Tamen,
Ekkoninte nun niajn morojn, vi verŝajne
Post pardonpeta vorto jam vin maltrudos
Tiel abrupte kiel vi venis. Adiaŭ, Briseo;
Aŭ, se vi deziras sperti la gastamecon
De nia reĝa domo dum kelka tempo, ĝis revido
Ĉe la vespera festo, kie ni volonte akceptos vin
Post, kompreneble, deca prezentado sub garantio
De iu responsa persono.

BRISEO

Kun granda bedaŭro
Mi konstatas, reĝino, la pravecon de via sinteno,
Kaj mi respekte plenumos la rigorojn de via moraro.
Hodiaŭ vespere mi venos kiel humila petanto
Al via kortego kaj dece prezentiĝos, esperante
Per interesaj paroloj kaj elektitaj spritaĵoj
Tiel veki tie vian scivolemon kaj apetiton,
Ke vi poste degnos proponi al mi la sopiratan
Inviton en vian buduarintimon.

PROKRIS

Tian

Esperon mi ne rajtas lasi al vi. Sciu,
Se tion vi ankoraŭ ne scias, ke la intimo
De mia buduaro, kiel ajn senkulpa –

BRISEO

Ho Prokris!
Kion vi ja pensas? Nur vortojn mi deziras
Interŝanĝi, nur vian animon admiri mi celas.

PROKRIS

Nu kompreneble! Ho, netolereble vi misprenas
La sencon de miaj ofte ripetitaj kaj ĝis nun
Efikaj paroloj! Malaperu tuj,
Insolenta persono, aŭ mi gvardianojn vokos,
Kiuj ĵetos vian nobelecon en la plej kotan
Sklavnecesejon de mia bieno. For!

BRISEO

Ho reĝino! Vi portas koleron superbe,
Kiel neĝkapa monto nubaron! Mia koro
Malgraŭvole adoras kaj samtempe tremas
Pro stranga miksaĵo de ardo kaj timego!
Vian ordonon mi ne riskus spiti: diru,
Mi petas, nur la kaŭzon de via majesta
Malvarmo.

PROKRIS

Mi estas edzino!

BRISEO

De edzinoj

La mondo plenas, tamen por trovi ĉaston
Similan oni voiaĝus tra tutaj landoj
Sensukcese.

PROKRIS

De edzoj la mondo plenas,
Sed por trovi edzon similan oni voiaĝus
Tra tuta mondo sen sukceso.

BRISEO

Ĉu vere?

Ĉu vere, reĝino?

RODOPEA

Vere, sinjoro, se vi konus
Mian mastron, vi ne tiom mirus
La fidelan servon de liaj familianoj.

BRISEO

Do ankaŭ vi amas lin, knabino?

RODOPEA

Kiel decas al humila lia servistino.

BRISEO

Tamen li forlasis vin, Prokris.

PROKRIS

Viroj

Havas devojn, kiuj necesigas foriron

De la hejmo kaj forlason de la amataj.
Io ilin pelas en la vastan mondon,
La sorto ofte ne permesas trankvilan
Ripozon kaj restadon ĉe la familio kaj fajrujo.
Tion ni scias kaj devas akcepti. Virinoj
Ankaŭ havas siajn devojn; se ili ne povas
Kuniri, ili devas restadi.

BRISEO

Sed amo

Sen nutro de intima intertrakto velkas.

PROKRIS

Kiel granita roko velkas.

BRISEO

Sed la tagoj
Flugas for, la monatoj kaj la jaroj forfulmas;
Velkas via junco kaj via belo; por kio
Utilas viaj rondaj brakoj, por kio
La dioj donacis al vi lipojn, mamojn
Kaj uteron, se la brakoj neniun alpremas,
Se la lipoj ne kisas, utero ne fruktas,
Mamojn neniun infano suĉas?
Ĉu amo estu sterila? Amo sopiras
Al vivo, al vervo, al la varma intimi
De la komuna nokto, al la tag-al-taga
Refreŝigo kaj replenumiĝo. Sufoko, ŝtonigo –
Ĉu tio estas la amo?

PROKRIS

Kion vi scias

Pri amo?

BRISEO

Mi amas.

PROKRIS

Kaj vi ŝin forlasis,

BRISEO

Ne, ne!

PROKRIS

Jes. Aŭ vi ne estus ĉi tie.
Se tiel arda estas via amo, kial
Vi ne restis ĉe ŝi, kie ajn ŝi troviĝas,
Kaj lasis alpremi vin al ŝia mola sino?
Kial vi ekvojaĝis nian Atenon
Anstataŭ resti en via kuna hejmo?
Pri amo vi scias nenion, nek pri ardo

Nek pri lojalo, aŭ vi forlasus vian amatinon
Nur en tia okazo, ke la viraj devoj
Forŝirus vin kontraŭ via volo, kaj vi neniam
Ĉesus pripensi kaj prisopiri ŝin kaj reirus
Al ŝiaj brakoj tuj kiam la senkompataj
Cirkonstancoj sufiĉe mildigus siajn rigorojn.
Sed vi venas nian urbon senĝene,
Vi seninvite kaj impertinente vizitas
Aliajn virinojn en aliaj landoj
Por fanfaroni pri via unika kaj grandioza
Pasio. Pa!

BRISEO

Mi amas vin.

PROKRIS

Ho senhonta!

RODOPEA

Sinjoro, ne licas!

BRISEO

Kiel senhonta? Kiel ne licas?
Ĉu kulpas mi, se ĉiu ero de mia mio
Vibras kaj solviĝas pro nura penso
Pri via helradia korpo, Prokris? -
Se trans marojn kaj terojn via personeco
Min vokis, en frenezo de batalo pelis min
Al furiozo preterhoma nur por tio,
Ke des pli frue mi liberiĝu de l' militodevoj
Kaj kuregu al vi, sorĉistino nevidita,
Al kiu mi tamen sentis tian neforskueblan
Simpation, ke sen vi mi ne volas vivi?
Ĉu mi hontu amon tiel di-donitan,
Kiu tiel konkeris kaj okupis min, ke mi mem
Ĝi fariĝis? Mi estas nenio alia ol unu
Tuta unika personigo de amo al vi.

PROKRIS

Se la edzo ĉeestus, ne tiel vi ofendus
La edzinon.

BRISEO

Ne ĵetu kontraŭ mian vizaĝon
Vian edzon! Ĉu mi devas silenti
Ĉi tiun senkomparan amofajron,
Kiu konsumas min kaj min turmentas,
Ĉar ia kaprico de la tempo kaj la sorto
Anticipe donis vin al alia viro?
Justo en la universo ne ekzistas,
Aŭ mi estus vin trovinta en la momento

De via naskiĝo, por varti kaj dorloti vin
Ĝis la nehaltigebla kaj nerenversebla tempo
Pretigus vin por akcepti mian maturan amon.
Sed anstataŭ tio alia viro vin trovis,
Kaj vi - vi estis tre juna, tre virga,
Stulteta kiel ĉiuj knabinoj - vi supozis lin
Mi. Kaj vi bonvenigis lin. Kiel vi povis,
Revema -kaj malpraktika virgulino, scii,
Ke necesis nur iom pli da pacienco,
Iom pli longa atendo, ĝis mia alveno?
Mi pardonas vian malprudenton tiaman,
Ĉar vi estis ja tre juna.

PROKRIS

Vi pardonas mian- !
Vere, neniam mi aŭskultis galimacion
Similan. Vi estas freneza, sinjoro, efektive.

BRISEO

Freneza pro amo.

PROKRIS

Pro amo al vi mem.
Rodopea, konduku eksteren ĉi monomaniulon.

BRISEO

Ĉu vi estas dura kiel diamanto, reĝino?
Ĉu eĉ ne unu guteto de kompatato moligas
Vian koron pri mizerulo malespere
Vin amanta?

RODOPEA

Ah, ĉesu. Kion signifas
Ĉi tiu busmuelado pri amo
Al mia mastrino? Se vi neniam antaŭe
Okulis ŝin, kian sencon havas viaj mensogoj
Pri aminspiro dum bataloj kaj vokado
Trans tutaj oceanoj? Ĉu vi supozas nin
Naivuloj?

BRISEO

Naiva vi ja estas, paserino,
Se vi supozas, ke por ekfloro de amo necesas
Senpera intervidiĝo. Ĉu oni neniam,
Do, amis revatan personigon de la aspiroj
De sia idealismo? Kio okazas,
Laŭ via opinio, se la revo fariĝas
Realo, se la kompatinda revinto
Iam vidas karnigon de sia fantaziaĵo?

PROKRIS

Trovinte, ke ŝi estas jam edzino, li kaŝas
Sian senesperan amon en forgesita korangulo,
Kie ĝi velkas pro malatento kaj baldaŭ mortas.

BRISEO

Diru prefere: trovinte, ke la edzo
Estas en malproksima lando, li persvadas
Per la pura pasio de sia freŝa amofajro
La edzinon akcepti lin en tiun liton,
Kiu malvarmiĝis al ŝi dum longaj
Senamaj noktoj.

PROKRIS

Ĉu vi supozas,
Ke edzino, liberiĝinte de la tedaj postuloj
De unu viro, stulte sin ŝarĝus
Per la fuŝaj karesoj de alia?

BRISEO

Ta!

Blago. Diru honeste, reĝino,
Ĉar malhoneste vi ne povas respondi,
Ke noktoj senamaj estas jarolongaj!

PROKRIS

Noktoj senamaj estas jarolongaj

BRISEO

Enirinte malvolonte la liton, vi kuŝas
Maldorma ĝis viaj palpebroj brulas
Kaj vi plorsingulte preĝas Morfeon
Ke per sia beno li liberigu de turmentoj
Vian izolan animon kaj sopirantan korpon.
Finfine ekdormiĝinte, vi en sonĝoj
Iras renkonte al nevidata amanto
Kaj kun netolerebla sopiro pli kaj pli
Avide vin streĉas al tiu brusto
Azila - sed vi vekiĝas, reĝino;
Estas ankoraŭ mallume; kaj vane
Vi turnas vin al la senkapa kuseno
Apud la via, kiun mem viaj larmoj
Malsekigas. Kaj ĉion ĉi ne unu fojon,
Sed ofte, ofte. Ĉu ne vere, Prokris?

PROKRIS

Jes.

BRISEO

Kial do, kial lasu trompi vin
Nebula kaj perfida idealo? Akceptu
Mian amon, Prokris, reĝino de mia koro!

PROKRIS

Vi estas diablo. For! Neniam revenu
Antaŭ miajn okulojn. Lasu min, lasu,
Senkora kaj plej lerta torturisto!

BRISEO

Ha! Vi deziras min.

PROKRIS

Manojn for!
Aŭ mi unge forŝiros viajn okulojn
Darnitajn!

BRISEO

Vi deziras min, Prokris.

PROKRIS

Per viaj nigraj misartoj, infernaskito,
Vi liberigas en mi sentojn, kiujn
Mi ĝis la nuna momento regis kaj bridis,
Sed kiuj nun inundas mian tutan
Membraron kaj min forglutas. Jes!
Mi deziras vin. Jen! Ĉu fine vi estas
Kontenta, ho bela, ruĝa, bruta,
Misaŭgura ido de la furioj?

BRISEO

Kontenta!

*(BRISEO forŝiras siajn barbon kaj perukon,
kiuj montriĝas falsaj)*

Jes, mi estas kontenta, ho malfidela!

RODOPEA

Mia Mastro!

PROKRIS

Cefalo!

BRISEO

Cefalo.

Ĉu tiel vi firmanime atendis mian revenon,
Edzino - tiel, ke iu ajn nekonato
Povis per manpleno da vortoj mielaj
Hirtigi vian lascivon?

PROKRIS

Cefalo. Sed...

CEFALO

Ho, sentaŭga virino! La hidajn dubojn,
Kiuj dum la senfinaj tagoj de nia diseco
Min insidis kaj kaŝatendis, mi ĉiam

Plenpugne rebatis, ĉar mi supozis vin virta.
Kaj mi trovas, ke mian fidon mi malŝparis
Kaj mian dolĉan revaron mi teksis trompote
Ĉirkaŭ facilanima enkorpiĝo de adulto,
Amora ventkokino. Ĉu efektive tion
Mi meritis? Kiel mi iam ofendis
La diojn, ke tiel amare ili repagas
Al mi centoble la malvolontan ŝuldon?
Oj, Prokris, Prokris! Blanka vizio
De mia milite febrinta animo, jen bonvenigo
Malĝoja! Ĉu tiel diseriĝas tiu geedza
Feliĉo, kiu plenigis miajn tagojn kaj noktojn
Per varmo aŭtentike ĉiela? Adiaŭ,
Varmo kaj volupto! Adiaŭ - ej, virino,
Kien vi iras? Kial vi mute,
Surde, sen vorto klariga aŭ pardonpeta,
Ekiras? Revenu! Ankoraŭ mi ne finparolis,
Ankoraŭ restas feĉo da espero
En mia pokalo kiu, tro ĝisfunde
Glutita en unu fojo - Prokris!
Edzino, mi ordonas -

(Foriras PROKRIS)
Kalsono de Dio!

RODOPEA
Jen vi havas!

CEFALO
Kial, laŭ via opinio,
Ŝi foriris? Mi intencis pardoni ŝin.

RODOPEA
Se ŝi havas tiom sagacon, kiom pulo
Mense malmatura, ŝi furzos pri via
Pardono. Jen mia opinio.

CEFALO
Gardu
Vian langon, sklavinon; ankoraŭ
Mi estas mastro en ĉi tiu loko. Insolenton
Mi scios kompensi.

RODOPEA
Stranga mastro,
Kiu rampas ŝteliste en sian hejmon,
Kaŝinte sian onesta vizaĝon preter barbaĉo!

CEFALO
Ĉu ne prave? Ĉu mi ne malkaŝis
La kondutomankojn de mia estimata edzino,

La ludojn, per kiuj sendube ŝi distris sin
Centfoje dum mia foresto –

RODOPEA

Mensogo!

Neniu alia virino, de la heraklezaj
Pilastro; ĝis la proksima landlimo de Asirio –
Kaj tre certe neniu en la malĉastaj
Terenoj pli oriente - estintus tiel
Centprocente neŝancebla malgraŭ tentoj
Eksterordinaraj -

CEFALO

Ha!

RODOPEA

Nu, kio?

Ĉu vi supozas, ke al bela soleca juna
Edzino, kies rango devigas al ŝi multajn
Publikajn devojn, mankus svatantoj?

CEFALO

Fermu! Ĉion ĉi mi scias. Bone
Mi konas tiujn tipojn mankisajn,
Dandajn, bovokulajn, kiuj emas rikolti,
Kie ili ne semis. Peston al ili!

RODOPEA

Kaj vi? Kompreneble dum via; longaj vojaĝoj
Vi restis senmakule ĉasta, kaj neniam
Per vorto aŭ - pli grave - gesto perfidis
La edzinon, kiu vin fidis. Ho, paragono!
Ho perfektulo! Ho senkompara fenomeno,
Kies similulon neniam antaŭe vidis
Nia pekema mondo!

CEFALO

Por viroj la afero

Estas tute alia.

RODOPEA

Ĉiam la viroj

Tiel aranĝas la aferojn.

CEFALO

Ne klopodu

Trudi al mi senton de kulpo.
Ne mi kulpas, sed mia edzino, kies kulpon
Mi mem vidis kaj spertis.

RODOPEA

Blindaj viroj!
Aŭskultu, aŭ estos jam tro malfrue:
Via edzino estas ĉasta! Malprave
Kaj maljuste vi traktis ŝin, kaj mi esperas,
Ke ĝustatempe honto malfermos al vi
La okulojn.

CEFALO
Sed mi mem lezis
Ŝian ĉaston.

RODOPEA
Jes, mia mastro,
Vi mem.

CEFALO
Kion vi aludas?

RODOPEA
Ĉu ne rajtas edzino deziri sian edzon?

CEFALO
Ta! Ŝi ne rekonis min.

RODOPEA
Ŝia mensa rekono,
Certe, postlamis la rekonon de ŝia korpo,
Kiu sin direktis al viaj brakoj pro senerara
Instinkta rekono de ĝia parulo sola.

CEFALO
Vi opinias do, ke ŝi cedis al mia pledo
Ĉar ŝi senkonscie rekonis min.

RODOPEA
Neniu
Alia klarigo eblas.

CEFALO
Rodopea,
Iru serĉi mian edzinon. Diru al ŝi,
Ke mi tre kore petas ŝin - ha!

(*Venas* PROKRIS)

Prokris, mia kara, vi revenis!

PROKRIS
Iru,
Rodopea.

RODOPEA
Volonte, sinjorino.

(RODOPEA *foriras*)

CEFALO
Kara,
Pardonu min. Freneza mi ja estis.

PROKRIS
Mi pardonas vin.

CEFALO
Kiel seke vi prononcas
Mian amnestion, kvazaŭ ĝi estus mortkondamno.
Ĉu vi ne volas per kiso sigeli signe
Vian pardonon, kaj bonvenigi taŭge la edzon
Neindan, al kiu vi dum tiel longa foresto
Fidelis pli firme ol farintus iu ajn
Virino de la heraklezaj pilastroj ĝis la proksima
Limo de Asirio, kiel li nun
Iom malfrue konstatas?

PROKRIS
Jen, do.

CEFALO
Via vango estas glata kaj freŝa, Prokris,
Sed viajn lipojn soifas mia buŝo soleca.
Salutu min, kara, kiel edzino amanta.
Ho, ne turnu al mi la dorson!
Ĉu vi ŝajnigas indiferenton, aŭ ĉu vere
Glacio premas vian koron? Venu
En mian brakumon, kaj la tenera ardo
De miaj karesoj baldaŭ degelos ĝin!

PROKRIS
Kial vi ne venis al mi kun tiaj paroloj
En la komenco? Ho efektive, tiaj paroloj
Tiam ne necesus, ĉar la subbrulanta
Fajro en mia koro estus flaminta tuj
Je ekvido de viaj eterne rememoritaj
Trajtoj!

CEFALO
Sed vi pardonis min.

PROKRIS
Pardono
Estas malmulte incendia hejtaĵo ama.
La fajron vi preskaŭ sukcesis estingi:

Necesos la nigriĝintajn karbojn priblovi
Singarde kaj obstine por ĝin reŝamigi,
Verŝajne.

CEFALO

Kial entute vi revenis,
Se tiel malkreskis via amo al mi?
Ĉu ne pli facile kaj kontentige, min forlasi
Por ĉiam?

PROKRIS

Nek facile nek kontentige,
Krom dum la unua horo de la decidigo.
Ne estas facile, estas preskaŭ neeble,
Rompi la fundamenton de sia vivo ĝisnuna.
Pli facile flosi laŭ la fluo elektita.

CEFALO

Ho bela perspektivo! Ĉu mi devos ŝvebi
Ĉirkaŭ vi kvazaŭ komplezema hundo
Ĝis vi bonvolos frapeti mian vilan kapon
Kaj permesos al mi leki vian fridan manon?
Tion mi ne toleros, damne! Prefere
Mi iru novan militon tuj, kaj revenu
Nur tiam, kiam la ardo ne plu torentos
En miaj vejnoj.

PROKRIS

Kaj kompensu la seniluziiĝon
Per mergiĝo en la brakojn de virinoj
Malpli sinceraj sed pli konkereblaj.

CEFALO

Ne, Prokris, ne. Aŭ eble jes.
La korpo havas siajn apetitojn. Sed
Ĉiam mi serĉos vin, kaj vin ne retrovos.
Io el vi eniris mian mion, barante
Mian regnon al aliaj vizitantoj,
Kaj sufokante en mi ĉiun sopiron kaj idealon,
Kiu vin ne celas. Ho Prokris, Prokris!
Rigardu min, edzino. Ĉu vi ne komprenas,
Vere, la profundan malĝojon, kiu preskaŭ
Min frenezigas kiam mi eĉ supozas
Finon al tiu vivo, kiun ni vivis kune?
Rigardu min, kara, reĝino, rigardu
Profunden en miajn okulojn!

PROKRIS

Kion vi vidas
Per tiuj okuloj barantaj, kies radioj
Repuŝas mian rigardon malgraŭ via invito?

CEFALO

Mi vidas ... Mi vidas ... valon, kie mi volas
Min paŝti, valon kies ridetantaj teroj
Turnas al mi bonvenigan mienon, Ĉu ne?
Ĉu mia sopiro min trompas, Prokris, prezentante
Tion, kion mi volas vidi, sed ne vidas?
Aŭ ĉu vi ... bonvenigas min, kara?

PROKRIS

Venu en vian valon, kies freŝaj herboj
Kreskis por vi dum tiom da solecaj printempoj.
Mi ne povas koleri vin, ĉar via vireco
Renkontis foje mian inecon kaj ĝin prenis
Al si por ĉiam. Venu, knabo malsaĝa.

CEFALO

Mi venas ...
... Mi deŝirus la sunon
El sia ora ĉaro por ornamo vian frunton,
Se jam ĝiaj radioj ne palus antaŭ la brila
Miriga belo de viaj trajtoj. Tamen,
Se vi deziras ĝin, nur petu.

PROKRIS

Kara ...

CEFALO

Parolu, mia dolĉa.

PROKRIS

Mi emas peti ...

CEFALO

Petu do.

PROKRIS

Ne koleru min.

CEFALO

Nu?

PROKRIS

Kara,
Lasu kreski, mi petas, vian barbon.

CEFALO

Ej, kio? Diable ...

PROKRIS

Vidu, vi koleras.

CEFALO

Ne. Tute ne. Sed ne estus taŭge,
Ĉar certe ĝi ne kreskus ruĝa.

PROKRIS

Negrave!

Barbo tiom konvenas al viaj trajtoj.

CEFALO

Kara mia, antaŭ la morgaŭa mateno
Mia barbo jam kreskintos tiom,
Ke vi petegos, ke mi razu min por ne gratvundi
Vian persikan vangon per miaj karesoj.
Voku Rodopean kaj ordonu ke neniu
Nin maltrankviligu ĝis –

PROKRIS

Ĝis kiam, edzo?

CEFALO

Ĝis la tago post la mondfino.

KURTENO

jam publikigita en *Unufingraj melodioj*, Stafeto, 1960